

Leterujo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 478, 1972.12.05 & 08

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Fine de tiu ĉi jaro ni malfermas nian leterujon por respondi al la afablaj salutoj de niaj skribemaj geaŭdantoj.

A.- Ĉifoje ni ricevis leterojn kaj poŝtkartojn el 28 landoj kaj 5 kontinentoj. Jen pruvo pri la universaleco de nia lingvo. Skribis geaŭdantoj el Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanioj okcidenta kaj orienta, Hispanio, Hungario, Islando, Italio, Jugoslavio, Madagaskaro, Malto, Nederlando, Norvegio, Nov-Zelando, Pollando, Portugalio, Rumanio, Sovetio, Svedio, Svislando kaj Usono.

Cl.- En Aŭstrio ni salutas sinjorinon Grete Breunlich en Vieno.

A.- En Belgio ni salutas sinjoron Michel Druart en Merksem kaj la gazeton *Heroldo de Esperanto*, kiu aperigis artikolon honore al la 25-jara jubileo de niaj esperanto-elsendoj ĉe Svisa Radio.

Cl.- En Brazilo ni salutas sinjoron Enivaldo Alves Silva en Maceio. Li trovas, kiel pluraj geaŭdantoj, ke la hor-indikoj en nia Radio-programo, ne estas tre klaraj. Ni reekzamenos tiun demandon. Ni memorigas, ke nia radio-programo uzas la grinvican horsistemon. Ĉiu transskribu la horojn en la propran horsistemon.

A.- En Britio ni havas multajn geaŭdantojn. La pasintan aprilon okaze de prelegvojaĝo ni renkontis plurajn el ili, estante eĉ iliaj gastoj por manĝoj kaj tranoktado. Ni salutas sinjoron F. Blunden en Londono kaj gesinjorojn John kaj Florence Brownlee en Upminster. Japana samideanino, kiun ili gastigis, sinjorino Kumiko Joda el Sizuoka, aŭdis por la unua fojo esperanton ĉe la radio kaj ŝi sonbendis nian prelegon pri Kabe, por ĝin reaŭdigi en Japanio.

Cl.- Ni salutas sinjorinon Sonja Catling-Brun en Nailsea, kiu ĝuas pri la malflankeco de la esperanta kaj germana programoj de Svisa Radio.

A.- Ni salutas doktoron Albert Goodheir en Lochgilphead en Skotlando, sinjoron D. Gregor en Northampton kaj gesinjorojn B. Najbaro en Keighley, kiuj, kiam la brita horaro ŝanĝiĝis komence de somero, perdis kontakton kun niaj elsendoj, ĉar ili ne pensis, ke sole Britio faris tiun ŝanĝon. Ili faris interesan demandon : *Kion vi faras kun la poŝtkartoj, kiujn vi ricevadas ?*

Cl.- Ni unue rigardadas la bildojn kaj tiel admiras multajn belajn vidindaĵojn. Poste ni ordigas tiujn poŝtkartojn inter la korespondaĵoj en ordigilojn. Se poŝtkarto aŭ leterkoverta havas poŝtmarkon aŭ stampadon, kiu estas en rilato kun la esperanto-vivo, ĝi estas direktata al la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds por la esperanto-arkivejo.

A.- Kaj la poŝtkartoj, kiuj havas bildojn de belaj kostumoj viciĝas en mian kolekton pri folkloraj kostumoj.

Cl.- Do, se vi volas plezurigi mian edzinon, sendu al ni poŝtkartojn kun folklore vestitaj homoj.

A.- En Britio ni ankoraŭ salutas sinjoron Henri Palmer en Bristol kaj gesinjorojn Alice kaj Walter Peake en York. Ili estis kontentaj trovi la foton de doktoro Arthur Baur kaj de mia edzo Claude Gacond en la printempa programo de Svisa Radio, kaj faras la demandon : *Kiam la fotoj de la parolantinoj ?*

Cl.- Al ĉiuj niaj skribemaj aŭskultantoj ni dissendis multobligitan leteron, kiun akompanis kelkaj dokumentoj : numero de la revuo *Svisa Espero*, kie ĝuste troviĝas la fotoj de sinjorinoj Heidi Baur kaj Andrée Gacond, informiloj pri la 16-a Esperantista Skiferio okazonta en Adelboden kaj pri la 14-a Eŭropa Ferio-Semajno okazonta en Fürigen apud Lucerno.

A.- Ni salutas gesinjorojn Ethel kaj Wim Prent kaj gesinjorojn John kaj Helga Rapley en Ilford, sinjoron Peter Schilperoord en London kaj junan aŭdanton, Ivan Tarrant en Harlow, kiu skribis :

Cl.- *Mi estas 15-jara knabo ; baldaŭ mi faros ekzamenon pri Esperanto. Por ĉi tio mi devas fari iom da kurslaboro. Unu laborero estas elektebla, kaj mi elektis la temon **Esperanto en radio kaj televido**.*

A.- Kun intereso ni ricevus kopion de tiu kurslaboro por povi raporti pri ĝi okaze de radio-elsendo.

Cl.- Fine, ĉiam el Britio, ni salutas sinjoron Geoffrey Wood en London, la gelernantojn de la duagrada lernejo Loxford, kie, se ni ne eraras, ni havis la okazon prelegi kaj la 30 partoprenintojn de la Esperanto-Semajno ĉe Barlaston, kiuj aŭskultis unu el niaj radio-prelegoj. Inter la subskribintoj ni povis legi la nomojn de Marjorie Boulton, Rytjkov kaj Brownlee.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. La venontan semajnon ni daŭrigos nian babiladon kun niaj geaŭdantoj.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!